

# Eŭropa Bulteno

Majo 2016, Numero 160

## MALFERMAJ ARANĜOJ DE LA 101-A UK DE ESPERANTO EN NITRO



La loka kongresa komitato (LKK) de la 101-a UK en Nitro volas plej eble malfermi nian kongreson kaj Esperanton al ekstera faka kaj laika publiko en Slovakio, Eŭropa Unio/Eŭropo kaj la mondo. Des pli grave ke tio okazos dum la sesmonata Prezidado de Slovakio en la Konsilio de Eŭropa Unio, kiu komenciĝos la 1-an de julio 2016. Ni organizas tri ĉefajn malfermajn aranĝojn:

**20-a Internacia Medicina Esperanto-Kongreso (IMEK)** inter la 20-a kaj 22-a de julio 2016 estas organizata de la Universala Medicina Esperanto-Asocio kaj la Slovaka Esperanta Federacio kune kun la Hospitalo de Nitra. La jubilean kongreson aŭspicios Tomáš Drucker, Ministro de Sano de Slovakio, kiu sendos al la partoprenantoj sian salutleteron. Vytenis Andriukaias (LT), Komisionano de Eŭropa Unio por Sano kaj Nutraĵsekureco, kiu estas profesie kardioĥirurgo kaj mem ankaŭ esperantisto, jam sendis al gekolegoj/partoprenantoj de IMEK sian salutleteron. Temo de la ĉi-jara IMEK estas: “Medicinistoj kaj tutmondiĝo — kiajn medicinistojn bezonas la nova jarcento?”, pri kiu prelegos kaj diskutos esperantistaj kaj slovakaj kuracistoj/medicinistoj. La kongreso estas malfermita al ĉiuj interesatoj. Aliĝi eblas je la retadreso: [umea@uea.org](mailto:umea@uea.org).

**Interreligia forumo en Centra Eŭropo (CEIF 2016)** okazos lunde la 25-an de julio 2016 en Nitro, kiun organizas la Forumo de Mondaj Religioj Slovakio, la Slovaka Esperanta Federacio, la Universitato de Konstanteno Filozofo de Nitra kaj la Fondaĵo de Anton Tunega. CEIF estas malfermita kaj al kredantoj kaj al nekredantoj, tiel ankaŭ al esperantistoj kaj neesperantistoj por trakti kaj diskuti aktualajn gravajn temojn de nuntempo en kvar paneloj:

migrado kaj integriĝo; malriĉeco kaj malegaleco de enspezoj; paco kaj sekureco; dialogo inter religioj: pri kio? kial? kiel? Fine de la forumo okazos interreligia renkontiĝo en preĝo, kiun partoprenos panelistoj de la forumo pere de preĝoj aŭ kantoj por prezenti en praktiko „unuecon en diverseco“. Pri la CEIF kaj ĝiaj temoj estas en Slovakio granda interesiĝo. Organizantoj supozas, ke ĝin partoprenos proksimume 200 partoprenantoj kaj deziras, ke tiu ĉi grava evento estu vere malfermita kaj partoprenu ĝin duone esperantistoj kaj neesperantistoj. Ĝis nun aliĝis multaj neesperantistoj. Organizantoj klopodas diversmaniere informi esperantistojn - UK partoprenantojn pri tiu ĉi malfermita forumo, interesigi ilin, ke ili aliĝu jam nun, ĉar povos okazi, ke post ilia alveturo al Nitro la 23-an de julio 2016 ne plu estos liberaj lokoj.

Ĝis nun sian partoprenon konfirmis altaj reprezentantoj de 8 el 9 mondaj religioj. Menciidas, ke sian partoprenon jam konfirmis Ján Figel' (SK), speciala deputito de Eŭropa Unio por religia libereco en la mondo, antaŭ nelonge nomumita de la Eŭropa Komisiono, kiu estas prezidanto de la Fondaĵo de Anton Tunega, Bruselo/Bratislava. Dum la solena malfermo de CEIF nome de nia esperantista movado alparolos partoprenantojn Prof. Humphrey Tonkin (US), eksa prezidanto de UEA kaj eksa rektoro de Universitato de Hartford. Inter panelistoj de 4 tempaneloj de CEIF estos ankaŭ 6 esperantistoj. Nia lingvo estos unu de 3 laborlingvoj de la forumo (SK, EO kaj EN).

La organizantoj de CEIF invitas ĉiujn UK partoprenantojn (kredantojn kaj nekredantojn) al „malfermita kleriga lunda forumo“ de neesperantistoj kaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri 4 menciitaj aktualaj kaj gravaj temoj de la mondo. Ili povos prezenti en praktiko, ke Esperanto-movado malfermiĝas al la ekstera mondo, volas kontribui al interkultura kaj interreligia dialogo kaj serĉas aliancinojn inter neesperantistaj movadoj/organizoj por komuna agado. Partopreno al CEIF estas libera post aliĝo. Pliaj informoj kaj aliĝilo estas en la retpaĝo: <http://parlament2017.sk/interreligia>.

**Lingvopolitika konferenco de landoj V4+** pri la temo “Perspektivoj de lingva komunikado en EU”, kiu okazos la 28-an kaj la 29-an de julio 2016 en la Universitato de Konstanteno Filozofa (UKF) en Nitro. Ĝi estas subtenita de la Internacia Viŝegrada Fonduso, de la Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio, kun faka garantio de la Fakultato de Mezeŭropaj Studoj de la Universitato de Konstanteno Filozofa. La konferencon aŭspicias Miroslav Lajčák, Ministro de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio. La konferenco estas listigita inter aranĝoj de la Prezidenteco de Slovakio en la Konsilio de EU. Sian partoprenon jam konfirmis, kiel ĉeforatoroj du nuntempaj eŭropaj komisionanoj: Tibor Navracsics (HU) por klerigado, kulturo, junularo kaj sporto, Vytenis Andriukaitis (LT) por sano kaj nutraĵsekuro kaj eksa komisiano Ján Figel' (SK) por klerigado, kulturo kaj multlingvismo (2004 – 2009).

La konferenco estos noviga, ĉar la unuan fojon partoprenos ĝin kune politikistoj, lingvistoj kaj reprezentantoj de civitanaj organizoj el la Viŝegradaj landoj – Ĉeĥio, Pollando, Hungario, Slovakio, sed ankaŭ el samopiniantaj landoj, kiel – Italio, Hispanio, Irlando, Litovio, Latvio, Estonio, Kroatio, Slovenio, Rumanio kaj Bulgario, kiuj konscias pri la ĝisnuna malegaleca aplikado de naciaj lingvoj en la komunikado de la Eŭropa Unio. Partoprenantoj komune diskutos en paneloj kaj rondaj tabloj pri 3 ĉefaj temoj, kiujn enkondukos komisionano Vytenis Andriukaitis, kiu estas esperantisto, dum malferma plenkunsido en Esperanto:

1. *Lingvaj problemoj de civitana partopreno* - skizo de la nuntempa stato kaj perspektivaj paŝoj por plibonigo de la lingva komunikado de civitanoj de diversaj nacioj kun ŝtataj organoj kaj institucioj de la Eŭropa Unio.
2. *Ekonomia integriĝo de unuopaj landoj al la Eŭropa Unio* - eliranta el la principo de egalaj lingvo-komunikaj ŝancoj kaj uzado de pluraj lingvoj laŭ strategiaj interkonsentoj kaj konkretaj branĉoj de ekonomio.
3. *Stato kaj perspektivoj de fremdlingva klerigado en la Eŭropa Unio* - paŝoj por subteno de klerigado, uzado de malgrandaj kaj najbaraj lingvoj kun apogo de evoluado de la eŭropa identeco kaj solidareco.

Partoprenantoj de V4+ landoj de la konferenco preparos komunan deklaron kaj rekomendojn, kiujn ili prezentos al naciaj parlamentoj/registaroj kaj ĉefaj institucioj de la Eŭropa Unio.

La organizantoj invitas al la lingvo-politika konferenco esperantistajn lingvistojn, instruistojn, membrojn de ILEI kaj EEU, reprezentantojn de civitanaj organizoj por partopreni en diskuto kune kun neesperantistaj lingvistoj kaj instruistoj pri lingvaj problemoj en la Eŭropa Unio kaj proponado de novigaj, egalrajtaj kaj efikaj solvoj por plibonigo de lingva komunikado por ĉiuj civitanoj de la Eŭropa Unio. Interesiĝantoj povas aliĝi en la retpaĝo de la konferenco: <http://www.polaco.fss.ukf.sk/conference/>.

Jozef Reinart

Sekretario de LKK de la 101-a UK

por eksterlandaj, diplomaciaj kaj fakaj aferoj

## 93-a GERMANA ESPERANTO-KONGRESO



De la 13-a ĝis la 16-a de majo okazis en Munkeno la 93-a kongreso de germanaj esperantistoj kun partopreno de iom pli ol 200 kongresanoj. Ĉeestis ankaŭ gastoj el 20 landoj inter kiuj ankaŭ el Japanio kaj Brazilo. La specifeco de la kongreso estis ke la E-societo de Munkeno festis 125 jarojn de sia ekzisto, malofta evento, ĉar ĝi estis fondita nur 4 jarojn post la unua lernolibro. Aperis tiusence bruŝuro „La historio de la E-klubo Munkeno“ kaj estis solenaj proklamoj de meritplenaj membroj de la klubo, kiuj samtempe estis LKK-anoj: Karl Breuninger, Ulli Ender kaj Fritz Hilpert.

La kongreso estis programe riĉega: pli ol 40 prelegoj tiel ke ili devis okazi po 4 aŭ 5 samtempe. Feliĉe ke ĝi okazis en tre konvenaj ejoj centre de Munkeno, kun multaj malpli grandaj prelegejoj kaj unu granda salono, dum tute apude estis ankaŭ la hotelo kun restoracio. Estas neeble listigi ĉiujn prelegantojn, mi aparte elstarigos kelkajn eminentajn kiel Detlev kaj Vera Blanke, Mikaelo Bronstein, Reinhard Foesmeier, Martin Schaeffer... Mi ree riĉiĝis aŭskultinte dekon da interesaj pelegoj de esperantistaj temoj ĝis politikaj...

Mi mem salutis la kongreson nome de EEU kaj prelegis pri Eŭropa identeco: kiel krei kondiĉojn en kiuj plimulto da eŭropanoj kredos sin sinceraj eŭropanoj.

Ankaŭ kultura programo estis impresa: kantis kaj muzikis, Mikaelo Bronstein, duopo Kajto, Atilla Schimmer. Ekskursiva programo sabaton estis abundega. Oni povis elekti inter deko da eblaj kelkhoraj posttagmezaj ekskursoj, kiel ekkoni Munkeon laŭ ĝia secesistila arkitekturo aŭ laŭ ĝiaj restaĵoj el nazia tempo ks.

La kongreso refoje elektis kiel prezidanto sinjoron Sebastian Kirf.



La kongreso montris ke la germana E-movado eliris el kelkjara krizo kiam daŭre malaltiĝis la nombro de kongresanoj kaj ankaŭ de membroj de la asocio. Ĉi-jare ambaŭ kreskis kaj videblas junaj fortoj kiuj komencas renovigi la strukturojn kaj agadmanieron adaptante la agadon al novaj teknologiaj ŝancoj.

Zlatko Tišljarić

## **PRI LA ELEKTA KONGRESO DE SLOVAKAJ ESPERANTISTOJ**



La 24-an de aprilo ĉi-jara okazis en Nitro (tuj post la kunsido de LKK por la 101-a UK) la kongreso de Slovacia Esperanta Federacio. Necesas akcenti, ke la okazo de la kongreso en Slovakio kiel aktuala UK-lando estis nepre necesa. Nome, SKEF restis post neatendita rezigno de Stanislav Marček sen sia prezidanto, sen respondeca redaktoro de ES kaj eĉ sen unu ano le LKK. Por forigi tiun-ĉi neakcepteblan staton okazis kadre de la kongreso kiel ĝia grava parto la elektoj por la nova estraro de SKEF. La voĉdonrajtigataj partoprenintoj decidis, ke kiel prezidanto de SKEF estis elektita Peter (Petro) Baláž, la vicprezidanto de SKEF fariĝis Michal Matúšov (KuboF), estrarano iĝis Stanislav Košecký kaj Zuzana Pichnarčíková kiel kasistino. La kontrolistino estas Magdaléna Feifičová (Feifi).

La kongreso krome konfirmis laŭstatute Stanislav Košecký kiel respondecan redaktoron de Esperantisto Slovaka kiel gazeto de SKEF.

La nova estraro kaj la tuta SKEF havas grandajn taskojn kaj defiojn antaŭ si – krom la okazigo de la unua UK an Slovakio la novajn alirojn al la E-aktivecoj estonte, kie devus domini precipe la sobraj argumentado kaj propagado eksteren, kion akcentis k.a. en sia parolado la novelektita prezidanto de SKEF.

Petro Baláž

## INVITO AL INTERNACIA RENKONTIĜO EN ALSOOERS 2016



Invito al jam la 16 jarojn daŭre okazanta internacie tradicia politika diskuto pri lingvaj problemoj, en Alsóórs (ĉe la lago Balatono, Hungario) de la 24a-26a de junio 2016.

Pliaj informoj troviĝas ĉi tie: <http://www.e-d-e.org/?lang=eo>

Bonvenas politikemaj civitanoj por diskuti pri aktualaj politikaj temoj kaj la komunikadproblemo en EU pro la manko de

demokrate elektita komuna lingvo. La uzata lingvo estos precipe Esperanto. Sed bonvenas ankaŭ civitanoj kun politika interesiĝo, parolantaj nur la hungaran, la germanan aŭ la anglan. Iliaj diskutkontribuoj estos tradukotaj.

Aktivuloj el la internacia partio EDE (Eŭropo Demokratio Esperanto) raportos pri siaj laboroj. Ĉefa temo: Kiel atingi ke Esperanto estu enskribita en diversaj landoj kiel „nemateria kulturheredaĵo“. Imiti la ekzemplon de la Pola EDE.

Interretaj ligiloj por sin prepari al la kunlaboro ĉi-sube:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Pola\\_Ascocio\\_E%C5%ADropo\\_-\\_Demokratio\\_-\\_Esperanto#La\\_Unesko-listo\\_de\\_nemateria\\_kultura\\_hereda.C4.B5o\\_de\\_homaro](https://eo.wikipedia.org/wiki/Pola_Ascocio_E%C5%ADropo_-_Demokratio_-_Esperanto#La_Unesko-listo_de_nemateria_kultura_hereda.C4.B5o_de_homaro)

<http://www.unesco.de/kultur/immaterielles-kulturerbe/in-deutschland/aufnahmeverfahren.html>

[http://szellemikulturalisorokseg.hu/index0.php?name=f1\\_szko](http://szellemikulturalisorokseg.hu/index0.php?name=f1_szko)

<http://www.unesco.hu/kapcsolat/kapcsolat>

Eugenio Macko

## PREZIDANTO DE EEU PRELEGIS EN NOVJORKO LA 22-AN DE APRILO



D-ro Seán Ó Riain prelegis pri la irlanda lingvo kaj la celoj de UN pri daŭrigebla evoluo en UN, Novjorko la 22-an de aprilo. Temis pri dutaga seminario organizita fare de Profesoro Humphrey Tonkin. Ĉeestis pli ol 100 lingvistoj kaj spertuloj por evoluo kaj pri UN el Usono, Britio, Nederlando kaj aliaj landoj. Profesoro Suzanne Romaine donis la ĉefan prelegon pri la katastrofa malapero de miloj da lingvoj, kiu tre verŝajne okazos dum la 21a Jarcento.

Seán Ó Riain prelegis pri la konkreta aspekto de lingvaj rajtoj kaj la centra loko de la irlanda lingvo en la lukto por nacia libereco, kiu fine sukcesis kiam la anglaj soldatoj forlasis Irlandon en 1922, post pli ol sepjarcenta okupado (kiu komenciĝis en la jaro 1169). La movado por savi la irlandan lingvon fondiĝis en 1893, kaj 69% de la homoj kiuj poste luktis milite por irlanda libereco unue aniĝis al la lingva movado. La ĉefo de la milita lukto, Michael Collins (Micheál Ó Coileáin), diris:

"La plej granda tasko estos la reviviĝo de la irlanda lingvo. La irlanda apenaŭ fariĝos nia lingvo dum ĉi-tiu generacio, eble eĉ ne dum la venonta. Sed antaŭ ol ni havos ĝin denove sur niaj langoj kaj en niaj mensoj, ni ne estos liberaj."

Tre konkreta kazo de la manko de lingvaj rajtoj okazis en Irlando en 1882. Irlandando, Maolra Seoighe (angle Myles Joyce), estis akuzita pri murdo en Galivo (kie okazis la 9a kongreso de EEU en 2012). Li estis senkulpa, sed kulpis pri alia krimo: li ne scipovis la anglan. Li nenion komprenis de la anglalingva procezo. Li provis defendi sin en sia denaska irlanda lingvo, sed la kortumo nenion komprenis, kaj eĉ lia leĝa reprezentanto antaŭ la kortumo ne komprenis vorton de la irlanda. Maolra estis pendumita la 16-an de decembro 1882. Nova irlandlingva libro, "Éagóir" (Maljustaĵo) de la iama lingva ombudsmano de Irlando, Seán Ó Cuirreáin, kiu ĵus estis eldonita, priskribas la tutan tragikan aferon. La afero estis longe preparolata en la brita parlamento. La tiama brita ĉefministro, William Gladstone, studis tiun kazon kaj fine komprenis ke Irlando bezonas la propran parlamenton, por fari leĝojn por la lando. Gladstone prezentis la unuan leĝproponon por irlanda aŭtonomio (First Home Rule Bill) en 1886, sed la parlamento ne akceptis ĝin. Sed estis la unua paŝo al la sendependeco.



Fine Seán Ó Riain parolis pri la nuna stato de la irlanda lingvo, kaj pri ebla plibonigo de ties lernado pere de la uzo de la lernfaciligaj ecoj de Esperanto. Poste Humphrey publike faris kelkajn demandojn en Esperanto, kaj Seán respondis. Tiam Humphrey demandis kiom da homoj komprenis la parteton en Esperanto. Dek kvin manoj leviĝis, kaj Humphrey diris ke eble pli da homoj komprenas Esperanton ol ni pensas!"

Seán Ó Riain

## POLIGLOTOJ ŜATAS ESPERANTON

Inter la 4 kaj 8a de majo 2016 okazis en Berlino (Germanio) la tre sukcesa **“Poliglota renkontiĝo” (Polyglot Gathering)**, jam la trian fojon organizita de esperantistoj, la multlingvulino Judith Meyer (Germanio) kaj de la iniciatinto de la esperantlingva Vikipedio, Chuck Smith (Usono) kaj ilia teamo. La ĉi-jaran aranĝon partoprenis 357 personoj et 44 landoj, sed dekoj ne povis aliĝi en la lastaj tagoj pro manko de loko.

La renkontiĝo montriĝis miksaĵo de junulara Esperanto-aranĝo kaj lingvistika konferenco, spertinterŝanĝo. Multaj el la partoprenintaj multlingvuloj estis ekstreme impresaj homoj, kiuj pasie kaj ofte profesie dediĉas sin al la lingvolernado kaj pioniras multdirekte. Ĉiu el ili certe scias pri Esperanto, ofte interesiĝas pri ĝi, multkaze lernas ĝin; almenaŭ pritraktas ĝin kiel ĉiujn aliajn lingvojn. Observeblis ke pli-malpli triono de la publiko kapablas uzi ĝin.

Kvankam la angla estis la dumkunvena pontlingvo, uziĝis Esperanto en multaj konversacioj, eĉ en la grandioza vespera kvizkonkurado. Inter la multnombraj prelegoj du okazis parte en Esperanto: « *Komparado de la tri plej facilaj lingvoj: la sveda, la indonezia kaj Esperanto*

» de Charlotte Scherping Larsson (Svedino kiu eklernis Esperanton pasintan decembron), «  
*Lingvopolitika ludo* » de Konstanze Schönfeld (Germanio).

Por scii pli: <http://www.polyglotberlin.com/> (en la angla)

Sylvain Lelarge

## EAQUALS-PREMIO AL JAGELONA UNIVERSITATO POR ESPERANTO-INSTRUADO

La Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato ricevis internacian nemovadan kvalit-rekonon de EAQUALS. La agado de tiu organizaĵo interesos esperantistojn de ĉiuj kontinentoj.



**EAQUALS** estas internacia organizaĵo pri plej altaj kvalit-normoj en instruado de fremdaj lingvoj. Ĝi estas registrita en Britio. EAQUALS konfirmas altan kvaliton de la instru-lerna procezo rigardata tutece, kiel instruado, ekzamenado, lernado kaj multaj aliaj gravaj elementoj ligitaj kun lingvoinstruado. EAQUALS partoprenas en laboroj de la Konsilio de Eŭropo, ĝi ankaŭ estas konsultata de la Eŭropa Komisiono pri aferoj rilataj al lingva edukado.



En la Jagelona Universitato estas instruataj pli-malpli 100 fremdaj lingvoj, sed 11, inter ili Esperanto, estas plej larĝe disponigataj en la granda fremdlingva fako de la universitato, kiu nomiĝas Jagelona Lingva Centro. Nur tiuj lingvoj celis (laŭ la rekomendo kaj kun forta apogo de la Rektoro) kaj akiris la Eaquals-kvaliton. La E-instruado en JU havas oficialan statuson, tial la altegan koston de la akredito pagis, kompreneble, la universitato.

<https://www.eaquals.org/2016/05/09/jagiellonian-language-centre-in-krakow-joins-eaquals/>

La signifo por Pollando

La Jagelona Universitato estas la unua universitato en Pollando, kies lingvoinstruado ricevis tiun prestiĝan kvalit-markon. Tiu fakto malfermas la vojon al la fremdlingvaj fakoj de aliaj polaj universitatoj. Jam kelkaj petis ĉi-rilatan helpon de la Jagelona Universitato.



La graveco por Esperanto

1. Laŭ konataj dokumentoj, la Jagelona Universitato estas la sola mondscale (kaj verŝajne la unua) supera lernejo, kies E-instruado havas la internacian Eequals-markon (de iom pli longa tempo slogano de la Jagelona Lingva Centro estas "Ni estas aliaj"). Esperanto troviĝas en la listo de la 30 lingvoj, kies instruado akiris ie en la mondo la prestiĝan Eequals-kvaliton. Tio estas grava por E-o, ĉar montras, ke
  - a) la lingvo povas esti traktata tute same, kiel aliaj, etnaj lingvoj, kaj ke
  - b) ĝia instruado povas atingi saman, internacie rekonatan nivelon kiel la angla, germana k.a.
  - c) E-o estas pli facile akceptebla en internaciaj fakaj medioj, se proponas ĝin granda ŝtata universitato.
2. La fakto de la bazita sur la plej modernaj normoj internacia rekono de la E-instruado, kiu jam realiĝis en granda universitato, povas malfermi la vojon al movadaj institucioj instruantaj E-on.

3.

La akiro de la internacia rekono de alta kvalito en lingvoinstruado estas konsiderata en la plej bona pola universitato kiel granda sukceso, kaj jam kelkajn monatojn daŭras festo...

La E-instruado en la Jagelona Universitato estas realigata de Maria Majerczak.

Ekde nun la oficialaj atestiloj kaj konfirmiloj de la Jagelona Universitato pri Esperanto kaj pri aliaj lingvoj enhavos la markon de la internacia EAQUALS-kvalito.

Maria Majerczak

## FINNA JUNULARO AGAS



[www.maailmakylassa.fi](http://www.maailmakylassa.fi)

Finnlanda Esperantista Junulara Organizo prezentis sian agadon kaj Esperanton en la festivalo Maailma kylässä, kiu okazis en Helsinko la 28-an kaj 29-an de majo 2016. La multkultura festivalo estas senpaga kaj celata por la tuta familio. En la programo estas diversaj artaĵoj, teatro kaj danco krom diskutoj, literaturo kaj ekzotikaj manĝaĵoj. Aldone multaj asocioj kaj organizoj prezentas sian agadon. Pliaj informoj kaj detala programo aperas en la retejo

Nia stando situis en la tendo "Foiro de Eblecoj" (Mahdollisuuksien tori) en la parko de Kaisaniemi. Ĉi-foje ni ekspoziciis poŝtkartojn kaj salutojn el aliaj landoj por montri, ke Esperanto vivas kaj estas vere internacia.

Paula Niinikorpi

## 75-a HISPANA E-KONGRESO BALDAŬ

De la 30-a de junio ĝis la 4-a de julio okazos en Herrera del Doque la 75-a hispana E.kongreso ku riĉa programo kaj pli da partoprenantoj ol dum antaŭaj kongresoj.

Detale pri la programo vi povas legi ĉi tie:

<http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/programo>

José Antonio del Barrio

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de majo 2016

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Jozef Reivart, Zlatko Tišljar, Petro Baláž, Eugeno Macko, Seán Ó Riain, Sylvain Lelarge, José Antonio del Barrio, Maria Majerczak, Paula Niinikorpi

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

